



POEMOJ

Pri Luno

El Ĉina Poezio

Tradukis plurlandaj esp-istoj

eLibrigis Guozhu

2008 Mezaŭtuna Festo

Al Amiko

– Trioletto

*Mi sopiras vin, mia kara,
en la Festo de Mezaŭtuno.
Kiam rondas la ĉina luno,
mi sopiras vin, mia kara,
Sub la brilo de luno mara,
ni ĉie festas en komuno.
Mi sopiras vin, mia kara,
en la Festo de Mezaŭtuno.*

Guozhu

2008-09-14

中秋致爱友

忆君长相思，中秋佳节日。
神州月亮圆，忆君长相思。
海上生明月，天涯共此时。
忆君长相思，中秋佳节日。
国柱 戊子仲秋

Zhang Jiuling (678-740)

Sopiro sub la luno

Leviĝas sur la maro lun',
mi estas fore de vi nun.
Amantoj plendas pri tro longa
nokto, sopiras en lunlum'.
Jen estingiĝas la kandel';
rose humidas la mantel'.
Lunlumon mi ne donas al vi;
en song' renkontu nin l' esper'!

Trad. Shi Chengtai



咏月诗抄(1):

张九龄(678-740)

望月怀远

海上生明月，天涯共此时。
情人怨遥夜，竟夕起相思。
灭烛怜光满，披衣觉露滋。
不堪盈手赠，还寝梦佳期。

Li Bai(701-762)

KANTO AL LA LUNO

— laŭ antikva ario

La lunon mi ne konis infanaĝe
kaj ĝin eĉ nomis blanka jad-telero;
aŭ prenis por spegulo de felando
fluganta inter nuboj en ĉielo.

Jen pendis du piedoj de la feo,
kaj pompe l' laŭro kreskis en prospero.
La blanka lepor' jam elpistis drogon,
kiu do ĝin aprezos laŭ prefero?

La bufo rodis ek la rondan ombron,
igis la lunon kripla en vespero.
Iam naŭ sunojn Hoŭ Yi paffaligis
savante la homaron el danĝero.

Kio do nun ankoraŭ indas spekti
post malapero de l' lun' en etero?
Ĉu mi foriru, ve, en senhelpeco,
dolore turmentite de l' sufero!

Trad. Guozhu



咏月诗抄(2):

李白(701-762)

古朗月行

小时不识月，呼作白玉盘。又疑瑶台镜，飞在白云端。
仙人垂两足，桂树作团团。白兔捣药成，问言与谁餐。
蟾蜍蚀圆影，大明夜已残。羿昔落九乌，天人清且安。
阴精此沦惑，去去不足观。忧来其如何，凄怆摧心肝。

Du Fu (712-770)

LUNA NOKTO

En Fuzhou la hodiaŭnoktan lunon
rigardas la edzino unusola,
ĉar la infanoj etaj ne scipovas
ankoraŭ pensi pri l' patro fora.
Ŝia harar' humidus de nebulo,
Kaj en purbrilo fridus la brakĉarmo.
Ho, kiam ĉe fenestro, prilumite,
Duopos ni kun sekigita larmo?

Trad.S.J.Zee

咏月诗抄(3):

杜甫 (712-770)

月夜

今夜鄜州月，闺中只独看。
遥怜小儿女，未解忆长安。
香雾云鬟湿，清辉玉臂寒。
何时倚虚幌，双照泪痕干。



Wang Wei (701-761)

Pavilono en bambuaro

Mi sidas sola en la bambuaro,
Sepkordon ludas kaj buŝfajfas nun.
Tiun desejon konas ja neniu,
Por min prilumi venas nur la lun'.


Trad. S.J.Zee

Wang Wei (701-761)

Pavilono en bambuaro

Loĝejo en bambuaro
Sidas sola mi kun ĝuo
Ludas harpon mi korŝire
Kaj voĉkantas tire.
Ne entrudas iu homo –
Min neniu ĝenas;
Nur la lun' kun bela lumo
Min saluti venas.

Trad. Kenji Ossaka



咏月诗抄(4):

王维 (701-761)

竹里馆

独坐幽篁里，弹琴复长啸。
深林人不知，明月来相照。

Wang Wei (701-761)

AŬTUNO ĈE MONTVILAO

En la montar' kvieta senhombrea,
Post pluvo de aŭtuno jam malfrua,
La hela luno brilas inter pinoj,
Sur ŝtonoj klaras fonta akvo flua.
Bambuoj bruas--- lavistinoj venas;
Pro fiŝboatoj lotusfloroj tremas.
Kvankam arom' printempa ne plu estas
Ĉi tie resti ni sinjoroj remas.

Trad. Laŭlum

Wang Wei (701-761)

Tra montoj dum aŭtunkrepusko

Montar-malpleno. Kun - neniu.
Vespervetero nun: aŭtun'.
Tra pinoj flagras lunlumbrilo,
Trans ŝtonojn fluas pura font'.
Bambuklakadon - lavistinoj,
Lotusojn puŝas fiŝboat'.
Printempaj floraromoj - foras.
Sed - restu supre plu, Sinjor'.

Trad. Kris Long



咏月诗抄(5):

王维(701-761)

山居秋暝

空山新雨后，天气晚来秋。明月松间照，清泉石上流。
竹喧归浣女，莲动下渔舟。随意春芳歇，王孙自可留。

Bai Juyi (772-846) :

**Invito al Amiko por Apreci Lunon
en la dekkvina nokto de la oka monato
en Huayang-templo**

En mezaŭtuna festo ĉarmas luno.
Ĉu ni kunĝuu laŭ mia invito?
Sur aŭtun-altano de Huayang-templo
ĉi-nokta luno klaras ĝis zenito.

Trad. Guozhu



咏月诗抄(6):

白居易 (772-846)

华阳观中八月十五日夜招友玩月

人道中秋明月好，
欲邀同赏意如何？
华阳洞里秋坛上，
今夜清光此处多。

Anonima:

LUNO

Lante leviĝas el easta maro,
iom post iom venas al nubaro.
Ĉi-nokte plenrondiĝas luna disko,
Kie ne lumas ĝia brila klaro?

Trad. Guozhu

咏月诗抄(7):

无名氏

咏月

徐徐东海出，
渐渐入天衢。
此夕一轮满，
清光何处无？



Wang Jian (766?-830?)

**RIGARDANTE LA LUNON
EN LA DEKKVINA NOKTO DE LA OKA MONATO
AL DEPARTEMENTESTRO S-RO DU**

Korvo ripozas arbe. Korta tero palas.
Humidas laŭro. Rosoj silente kristalas.
Ĉiuj rigardas al la luno en ĉi nokto.
Al kiu hejmo la aŭtuna penso falas?

Trad. Guozhu

咏月诗抄(8):

王建 (766?-830?)

十五夜望月寄杜郎中

中庭地白树栖鸦，
冷露无声湿桂花。
今夜月明人尽望，
不知秋思落谁家？



Du Mu(803-852)

AL HAN ZHUO, prefekta asistanto de Yangzhou

De foraj montoj en nebulo fluas la rivero.
Aŭtun' malfrua de la Sud' kun herboj en prospero.
La Ponto Dudek Kvar Feinoj en helluma nokto---
Kie instruas fluton ludi l' hom' de jada belo?

Trad. Laŭlum



咏月诗抄(9):

杜牧 (803-852)

寄扬州韩绰判官

青山隐隐水迢迢，秋尽江南草未凋。
二十四桥明月夜，玉人何处教吹箫。

Li Shangyin(813-958)

Chang E *

Sur glimekran'kandela ombro fundas,
La Lakta Vojo en aŭror' profundas.
Ŝi pentas, ŝtelglutinte eliksiron,
soleco ĉiunokte ŝin inundas.

Trad. Shi Chengtai

*) feino en la Luna Palaco laŭ ĉina legendo. Iam ŝtelmanĝinte eliksiron, kiun la Ĉiela Reĝino Wang-mu donacis al ŝia edzo Yi, ŝi alflugis feine en la lunon sole kaj restas tie ĉiam.

咏月诗抄(10):

李商隐(813-958)

嫦 娥

云母屏风烛影深，
长河渐落晓星沉。
嫦娥应悔偷灵药，
碧海青天夜夜心。

